# *Cubamotricidad 2022 por la fizika kulturo kaj sportoj*

*Image not found or type unknown*



**Foto: PL**

Havano, okt 20 (RHK)  La VIIa Kongreso de Cubamotricidad 2022 efektivi?os de la 24-a ?is la 27-a de oktobro en Varadero, banloko en la okcidenta de Kubo,  kun la celo pritrakti aferojn rilatajn al sporto, scienco kaj da?ripovo.

La Kongresejo Plaza América, en la fama kuba feriejo Varadero, gastigos la konklavon, en kiu partoprenos pli ol 500 delegitoj el 29 nacioj.

"Ni havos elstarajn sciencistojn, kiuj donos ?efprelegojn pri temoj kiel sportista trejnado kaj preparado, sportaj administrad-sistemoj kaj instigo en klasoj pri fizika edukado, inter aliaj," diris al la sporta ?urnalo JIT S-ino C.  Silvano, rektoro de la Universitato Manuel Fajardo de Fizika Kulturo kaj Sportaj Sciencoj (UCCFD).

„?i estos evento, kiu kontribuos  taksi kaj disvastigi ?ion, kion ni faras en la sciencoj de fizika kulturo kaj sporto”, diris la akademiano.

La temoj estos debatitaj persone kaj distance, en ses ?ambroj kaj na? laborkomisionoj.

Fonto: JIT

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/deportes/302497-cubamotricidad-2022-por-la-fizika-kulturo-kaj-sportoj

**Radio Habana Cuba**